

PENSEO

N-ro 284

jun. / 2015

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 26-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



antaŭvespere de karnavalo

antaŭvespere de karnavalo,
mi revis kiel naĝi en la karna valo.
knabinoj kaj mi pensionon ordis kaj
dekoraciis.
la mielan scenon rompis mia debalkona falo.

2012.11.18

potenco de esperisto

turniĝu la terглоbo laŭ lia volo,
alie lia salivero la kosmon inundos.
praktiku animaloj homoseksualecon,
ĉar lia piso gravedigos ŝtonojn; sablo
ekfekundos.

2012.11.19

pando-rubujo

en enua tempo mi pando-rubujon flaras,
kvazaŭ muŝoj serĉas manĝon aŭ nenion.
iafoje ratoj pie min demandas tie:
kiel ni atingos la ŝak-jam-union?



2012.11.20 - 2

kultura skuo

per la okuloj nigra-blankaj
mi volas legi la koloron de la oceano kaj ĉielo.

la blonda, blua, verda, ruĝa, bruna, griza...
min en la uteron tra la poroj sorbas la pelmelo.

2012.11.21 - 2

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Danco

La arboj de la placo staras piedpinte,
sindoneme al la senfino. Sed jen unu el ili, kiu
distingiĝas gracie kuŝante sur la herbo, kiel
dancisto por ricevi la bluajn aplaŭdojn de la
maja suno.

Ŝi ade kaj lante renversiĝis laŭ la takto de
l' tempo. En ŝajna ripozo, ĝi ankoraŭ laboras.
Printempe sin ornamas ĝi per rozkoloraj floroj,
kaj dolĉe akceptas la amindumantojn kaj la
ĝojon de l' infanoj.



Juiz de Fora, 12 /05/2015.

Agordo

Kaj turdo marŝas malpeze
sur la herbo de l' ĝardeno;
jen ĝi rigardas flanken, jen alien;
subite ĝi ekvidas min,
kaj mia tempo eterniĝas!

Juiz de Fora 09/05/2015.

Miserère, miserère!

Kion ni faris el vi, Patrino Tero?
Tordiĝas viaj intestoj
kaj semiĝas ruinoj.

Naturo funebras
la gefilojn perditajn en la kaoso.
Disfalas jarcentoj
el civilizaci' kaj kultur'.
Kriegas furie uraganoj,
Delire vomas vulkanoj.

Inundoj, ŝipdronoj...
La morto gvas la vejnojn
elĉerpitajn de l' planedo.
Miserère, miserère!
Mizerikordon, Sinjoro!

Juiz de Fora, 08/05/2015.

Mori (Usono)



AFORISMe (5)

Vivu kun ĝojo
kiel fiŝo en roĵo
Ĝojo estas
kaj la cel' kaj vojo!

Kiu laŭdas
sian laboron,
malgrandigas
ĝian valoron!

Vulpoj kaj lupoj
kiam ajn kunsidas,
NE pri bonaj aferoj
decidas!

Kiu estas
nek lupoj nek vulpoj,
ne eksidas

ĉe la tablo de lupoj!

Nur tiu, kiu zorgas
pri alia persono,
pli ol pri sia propra bezono,
meritas la sidlokon
sur la reĝa trono!

Se paco regas
en via domo,
vi ja estas
feliĉa homo

Interhoma milito
kaj batalo,
pruvas ke homo
estas animalo!

Kiu estas potenca
kaj kapabla,
Estu ankaŭ modesta
kaj afabla!

Tiu, kies amikeco
estas politiko
pli danĝeras ol
malamiko!

Cezar (Germanujo)



Sorto kaj destino

Naskite en hazarda tempo
ni vivas en malĝusta lok'.
Envintre logas nin printempo.
Destina estas la epok'.

Jen viro volus esti ino
jen ino revas esti vir'.
Ĉu sorto estas, ĉu destino?
Ĉu ĉio estas nur konspir'?

Kaj kial estas ni malriĉaj,
naskiĝis ie en vilaĝ'?


Ni kial estas superstiĉaj?
Pro kio mankas ofte saĝ'?

Militoj ĉiam reeksplodas,
soldatoj mortas en batal'.
Aliaj iam nin marodas,
ĉu tio ĉio pro fatal'?

Ĉu nur hazarde estas klasoj?
Kaj ia sorto la milit'?
Jam neas tion homamasoj,
kaj pli kaj pli fortiĝas spit'.

La sorton naskas intereso.
Profitojn nutras superstiĉ.
Eĉ homojn voras la progreso,
dum kreskas plu la superriĉ'.

Paŭlo Silas (Brazilo)



AMO ĜIS LA KERNO

Dumeterne, mi kaj miaj
internaĵoj freneze amos vin.
Iu tute sincera poemverkisto

Mi aŭdis, ke, sub eterna grundo,
Ostaron vian kuŝigis morto.
Ke trafis vin porĉiama vundo.
Ke via kor', sen sangflu' normala, ...
Ke fuĝis foren la vivosorto.
La mondo sen vi: destin' banala.

Mi aŭdis, ke, en pluvplena lundo,
Aŭdiĝis via plej lasta vorto.
Ke mankis al la morgaŭ' sekundo.
Ke nombris vin protokol' formala.
Ke velkis la foliar' sur korto.
Mallum' estas nun, al lum', egala.

Mi ploras, malgraŭ tagfina paco.
Alian ja mi neniam amos.
Kaj, kriples, mi, pro ekzistolaco, ...
Feliĉo min ne plenigos plu.

Belaĵoj tutordinare samos.
Min manĝos la neŝtopebla tru'.

Min kaptos neeltenebla lakso.
Mi, kaŭze de fekfluec', infanos.
Eliros el mi amhava gaso.
Kaj laŭte ekaŭskultiĝos bru'.
Poemon la brukadenc' deklamos.
Ho, helpu al mi, sanktul', Jesu'!

Siv Burell (Svedujo)



Aranea Reto

En nevidebla reto
mi trovas min baraktante
pri la kaŭzo pensante
kaj kompaton petante.



penetraĵo de la aŭtorino

Flugilojn mi ĵus havis,
flugis alten super herboj,
sentis ke inspiro gravis,
regis super fortaj verboj,
ĝis subite mi perdis
iom da perspektivo,
volis arte super deklivo,
sed eksciis ke ĉio fariĝis veziko
de deziroj kaj esperoj,
streĉis min al absurdo,
sed trovis min kaptita
de vento transportita
al aranea reto.

Staru fikse surtere
kiam kapo kreas fiere!

Aos Nossos Filhos



Al la idaro

(kantteksto)

Pardonu l' amaran mienon
Pardonu, ke mankas brakumo
Pardonu la spacforkonsumon
Ne l' sam' okazu al vi

Pardonu pro tiom da riskoj
Pardonu la senŝirmkomplikojn
Pardonu, ke mankas amikoj
Ne l' sam' okazu al vi

Pardonu, ke mankas folioj
Pardonu, ke mankas aer'
Pardonu l' senrajton elekti
Ne l' sam' okazu al vi

Farinte la netan kopion
Tranĉinte la nodajn ligilojn
Delasinte al vi la zonojn
Festu, kaj festu por mi

Post kiam laviĝis rankoroj
Post kiam laviĝis l' animo
Post kiam laviĝis la akvo
Lavu l' okulojn por mi

Post reburĝono de floroj
Post rekreskado de arboj
Post la rikolt' de la fruktoj
Pridiru l' guston al mi (bis)

Elportugaligis



Ŭel Roŝa (Brazilo)

Andrij Maliŝko (1912-1970)



Aŭronoj ĉerizkoloraj

Aŭguras tagiĝon helan aŭrora ĉerizkolor',
Vi eble jam min forgesis, forigis el via kor'?

Ja daŭre ni militadis, eluzis botstokon sur voj',
Kaj se rememori mortintojn, kaptos min tuj malĝoj'.

Kaj se pri vivantoj temas – mutiĝu do plor' kaj kri',
Ĉar iras milope amikoj, por ili trumpetas mi!

Trumpetas, ke l' verdan teron ni gardos en plaga hor',
Aŭguras tagiĝon gajan aŭrora ĉerizkolor'!

Elukrainigis



Petro Palivoda

(Ukrainio)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUA

La egaleco de ĉiuj estaĵoj

§02-14

Ququezi demandis Changwuzi, dirante:
“Mi aŭdis de Konfuceo, ke la saĝulo ne sin
okupas pri la aferoj de la mondo. Li ne ĉasas
profiton, nek evitas damaĝon. Li havas nenian

plezuron en profitserĉado. Li ne obstine tenas sin je la Taŭo. Li parolas, kiam li ne parolas. Li ne parolas, kiam li parolas. Tiele li migras trans la limojn de tiu ĉi tera mondo! La Majstro rigardis tion ĉi kiel fantazian priskribon pri la saĝulo, sed mi rigardas tion ĉi kiel la vojon de la mistera Taŭo. Kiel do vi opinias pri tio, mia kara sinjoro?”

“Tiu ĉi vortoj,” diris Changwuzi, “konfuzus eĉ la Flavan Imperiestron; kiel do Konfuceo povis ilin kompreni? Cetere, vi estas tro hasta en via taksado pri tio. Ekvidinte ovon, vi jam tuj dezirus aŭdi kokokriojn. Ekvidinte la katapulton, vi jam tuj dezirus havi rostitan kolombon antaŭ vi.

“Mi do provos diri al vi klarigojn, kaj vi aŭskultu ilin ne tro serioze. Kial do la saĝulo povas sin apogi kontraŭ la suno kaj luno kaj enbrakigi la universon? Ĉar tiamaniere li miksas ĉiujn objektojn en harmonian tuton, malakceptas la konfuzon de distingo, kaj ignoras la diferencojn en la socia hierarkio. La ordinaraĵoj klopodadas kaj penadas; la saĝulo vivas simplan vivon kaj estas en sencio. Li kunfandas la dek mil jarojn en unu tuton, senmiksan kaj simplan tuton. Ĉiuj estaĵoj estas por li tiaj, kiaj ili estas, kaj spontanee sekvas tiun ĉi saman vojon.

“Kiel mi povus scii, ke la amo al la vivo ne estas vana iluzio? Kiel mi povus scii, ke tiu, kiu timas la morton, ne similas al la vagulo, kiu forlasis juna la hejmon kaj pro tio ne volas reveni hejmen.

“La sinjorino Li Ji estis la filino de la landlima gardisto en Ai. Kiam la reĝo de la regno Jin komencis preni ŝin al si, ŝi forte ploris, ĝis la antaŭa parto de ŝia robo malsekiĝis de larmoj. Sed, post kiam ŝi venis en la reĝan palacon, dividis kun la reĝo la luksan liton kaj delikatajn manĝaĵojn, ŝi bedaŭris, ke ŝi iam ploris. Kiel do mi povus scii, ke la mortintoj ne pentos pri sia antaŭa avido je la vivo?

“Tiu, kiuj sonĝas pri luksa bankedo,

povas en la sekvanta mateno lamenti kaj plori. Tiu, kiuj sonĝas pri lamento kaj ploro, povas en la sekvanta mateno iri al ĉasado. Kiam ili sonĝas, ili ne scias, ke ili sonĝas. En sia sonĝo ili eble eĉ interpretas sonĝojn. Nur kiam ili vekiga, ili ekscias, ke ili sonĝis. Pli aŭ malpli frue venos la granda vekigo, kaj tiam ni sciiĝos, ke la vivo mem estas granda sonĝo.

“Kontraŭe, la malsaĝuloj ĉiam pensas, ke ili estas vekitaj, kaj ke ili scias ĉion. Kiuj estas reĝoj? Kiuj estas bovistoj? Ili faras precizajn distingojn. Sed kiel stulte! Konfuceo kaj vi ambaŭ estas en sonĝo. Kiam mi diras, ke vi estas en sonĝo, ankaŭ mi estas en sonĝo. Tia diro povas ŝajni paradokso. Sed se post dek mil epokoj ni povos iam renkonti grandan saĝulon, kiu scios fari klarigon pri tio ĉi, tiu okazo venos tiel rapide, kvazaŭ ni renkontus lin ĝuste en ĉi tiu tago.

“Supozu, ke vi argumentas kun mi. Se vi superas min, anstataŭ ke mi vin superus, ĉu tiam vi estas nepre prava kaj mi nepre malprava? Aŭ ĉu unu el ni estas prava kaj la alia malprava? Aŭ ĉu ni ambaŭ estas pravaj aŭ ambaŭ malpravaj? Ni ambaŭ ne povas scii, kaj ankaŭ aliaj estas en la nesciado. Kiun do mi petu decidi tiun ĉi disputon? Mi povas peti iun, kiu konsentas kun vi; sed ĉar li konsentas kun vi, kiel do li povas ĝin decidi? Mi povas peti iun, kiu konsentas kun mi; sed ĉar li konsentas kun mi, kiel do li povas ĝin decidi? Mi povas peti iun, kiu malkonsentas kaj kun vi kaj kun mi; sed ĉar li malkonsentas kaj kun vi kaj kun mi, kiel do li povas ĝin decidi? Mi povas peti iun, kiu konsentas kaj kun vi kaj kun mi; sed ĉar li konsentas kaj kun vi kaj kun mi, kiel do li povas ĝin decidi? Do, vi kaj mi kaj ĉiuj aliaj ne povas veni al interkompreniĝo; kiun alian do ni atendu ankoraŭ, por fari la decidon?

“La ŝanĝiĝantaj sonoj estas inter si interrilataj kaj samtempe ne interrilataj; ni do devas harmoniigi ilin nur interne de la limoj de la naturo kaj lasi ilin sole en la procezo de natura evoluado. Tia estas ankaŭ la metodo

pasigi nian vivon. Kion signifas la harmoniigo de objektoj interne de la limoj de la naturo? Por ĉiu afero se ekzistas pravo, ekzistas ankaŭ malpravo; se ekzistas ‘estas’, ekzistas ankaŭ ‘ne estas’. Se la pravo estas efektive pravo, ni ne bezonas disputi pri ĝia diferenco disde la malpravo; se la ‘estas’ estas efektive ‘estas’, ni ne bezonas disputi pri ĝia diferenco disde la ‘ne estas’! Ni forgesu la vivon kaj la morton; ni forgesu la diferencojn inter la pravo kaj la malpravo. Kaj tiele ni trovos ĝuon en la regno de la senfino, kaj tie ni havos la eternecon.”

§02-15

La Duonombro demandis la Ombron, dirante: “Ĵus vi paŝis, nun vi estas senmova; ĵus vi sidis, nun vi staras. Kial do tiaj kapricoj?”

“Ĉu mi devas dependi de io alia,” respondis la Ombro, “por ke mi estu, kia mi estas? Ĉu tiu io, de kiu mi dependas, devas ankoraŭ dependi de io alia, por ke ĝi estu, kia ĝi estas? Ĉu mi devas dependi de la skvamoj de serpento aŭ de la flugiloj de cikado? Kiel do mi povus scii, kial mi estas tia aŭ kial mi ne estas tia?”

§02-16

Iam mi, Zhuang Zhou, sonĝis, ke mi estas papilio, papilio gaje flirtanta tien kaj tien. Mi estis tiel feliĉa kiel papilio, ke mi eĉ forgesis, ke mi estas Zhuang Zhou. Kiam mi subite vekigis, mi mire trovis, ke mi denove estas Zhuang Zhou. Nu, ĉu do estis mi, kiu sonĝis, ke mi estas papilio, aŭ ĉu estis la papilio, kiu sonĝis, ke ĝi estas Zhuang Zhou. Inter Zhuang Zhou kaj la papilio devas esti ia diferenco. Tio estas nomata “la transformiĝo de objektoj”.

Elĉinigi



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Malutila helpo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Antikve
kampul’ kretena
brulas de maltrankvilo
pri sia plantoj grenaj
en stato ĝena.

Cerbumis
li pri rimedo
kreskigi ilin bone
por la grajno-gravedo
en planta bedo.

Li simple
al kampo iris
jen kun malpacienco
kaj l’ plantojn iom tiris
alten kaj diris:

“Tiele
ilin helpas mi
vegeti tute sane
kaj altiĝos pli kaj pli
sub suna radi’.”



Post penad’
li kun ĝoja sent’

lace reiris hejmen
kaj parolis kun kontent':
"Mi jam kun prudent'

la plantojn
altigis per pen'
kaj elĉerpiĝis morte.
Por pli da estonta gren'
indas l' entrepren'."

Ĉe tio
la fil' rapide
kuris al la grenkampo
esplori propravide
taksi decide

ĉu plantoj
kreskas normale.
Li deprimiĝis vidi,
ke l' plantoj velkis fale
mortis fatale.

Jadranka Miric (Serbujo)



Rememoro

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Faladas
iaj varmetaj
pluvoj. Ĉio odoras
je amo. Jen pluvetaj
vortoj. Poetaj.

Jam velkis
floro plukita.
Malfrua larmoverŝo.
Feliĉo forprenita,
kor' ĉagrenita.

Herbejo
ondiĝas milde.
"Ne tretu herbetejon!"
estis skribita ŝilde,
tut' konsilinde.

Okuloj
ĉielkoloraj
ekbrilis kompateme.
Kie estis kunlaboraj,
la tagoj oraj?

Tristeco
kiel nebulo
falas sur lian kapon,
kurbigis la grizharulon,
lacigis ulon.



AL, MIA PANJO

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Volus mi
vidi rideton,
vian mildan, panjeto.
Ho, kiel bonas peton
nomi sekreton.

Panjeto,
forflugis vi al
ĉielo endorminte.
Rigardas mi alten al
blua ĉielval'.

Nubetoj
sonĝe teksitaj
kvieta vin alportas.
Jen la floroj plukitaj
por vi donitaj.

Sezonoj
ŝanĝas regule.
Nur vi malĉeestas. Mi
atestas volontule.

Propra okule!

Herbejo
odoras flore.
Aŭdiĝas birda kanto.
Tersaluton memore
al vi. Elkore!

Nobla Alvoko

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Okazis
al nepalanoj
la tertrema tragedi’.
Helpu al azianoj!
Ho, eŭropanoj!

Severa
tertremego, ho.
Pli ol ses miloj! Estis
mortigitaj homoj! Ho,
resonas eĥo.

Retremis
tero fortege.
Tut’ malaperis Barpa.
Suferis etno ege.
Homoj multege.

Katmandu’
mondoheredaĵ’
estas plu enloĝebla.
Helpu homojn per nutraĵ’
kaj per tehnikaj’.

Enlandaj
kaj eksterlandaj
fakuloj solidare
partoprenu ni, are
digne, bonfare!

*Sopir-al-sudo (Ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfoma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Alphonse Daudet (1840-1897)



LA SIEĜO AL BERLINO

Reirante laŭ la avenuo de Champ Elisées, ni kaj d-ro V esploris la historion pri la tiama sieĝita Parizo pere de la muroj plenaj de kuglotruoj kaj la trotuaroj malebenigitaj pro mitralopafado, kiam ni estis alvenonta al la placo Stelo. Proksime al ĝi, la doktoro haltis tie, kie la Triumfa Arko estis ĉirkaŭita de grandiozaj konstruaĵoj kaj grandaj domegoj. Montrante domon ĉe vojkruciĝo, li diris:

“Ĉu vi vidis kvar fenestrojn fermitajn sur tiu balkono? En la unuaj tagoj de aŭgusto, t.e. tiu terura aŭgusto de la pasinta jaro plena de ŝtormoj kaj katastrofoj, mi estis venigita tien por diagnozi kaj kuraci malsanulon, kiu suferis de akuta apopleksio. Li estis kolonelo Jouve, kirasulo de la periodo de la unua Imperio. Laŭ koncepto de honoro kaj patriotismo, li estas malnova obstinulo. Tuj ĉe la komenco de la milito, li translokiĝis al la Champs-Élysées, loĝis en la apartamento kun balkono ... Divenu kial. Li volis ĉeesti ceremonion de niaj trupoj revenantaj en triumfo ... Tiu ĉi kompatinda maljunulo! Kiam la novaĵo de Wissembourg veni ĝis lia hejmo, li volis forlasi la tablon. Ĉe la fino de militnovaĵo aperis la deklaro pri malvenko de la franca armeo. Leginte la nomon de Napoleono, li tuj falis sur la teron kvazaŭ frapite de fulmo.

“Mi trovis, ke la maljuna kirasulo kuŝas laŭ sia tuta longo sur la tapiŝo de la ĉambro, kun ruĝiĝinta vizaĝo kaj obtuza mieno, kvazaŭ li ĵus ricevus bastonbaton sur la kapo. Se li ekstaris, li devis esti tre granda. Kvankam kuŝante, li ankoraŭ montriĝis tre altastatura kaj fortika. Li havis regulajn trajtojn kaj estis

belaspekta, kun belaj dentoj kaj krispaj blankaj haroj. Kvankam li havis la grandan aghon de okdek jaroj, li tamen aspektis... lia nepino genuiĝis ĉe lia flanko kun vangoj banataj de larmoj. Ŝi tre similis lin. Jen, kiam ili estis kune, ili povis esti rigardataj kiel du belaj antikvaj grekaj moneroj fanditaj el la sama muldilo. Unu el ili estis tre antikva kaj terkovrita kun randoj eluzitaj kaj la alia blindige brila kaj pura, kiu tute konservis originalajn brilecon kaj purecon nove fanditan.

“La sufero de tiu ĉi knabino min profunde kortuŝis. Ŝi estis posteulo de du generacioj da soldoj, ŝia patro en la stabo de marŝalo Mac-Mahon faris sian militservon, la figuro de la altstatura kaj fortika maljunulo kuŝanta antaŭ ŝi, ĉiam elvokis en ŝia menso alian egale teruran rememoron pri ŝia patro. Mi faris mian pejblon por konsoli ŝin, sed sincerdire, mi ne nutras multe da esperon en la koro, ĉar lia malsano estis serioza hemiplegio, kiun ni devis trakti, kaj la ebleco resanigi estis tre malgranda por la maljunulo je la aĝo de okdek jaroj. Fakte estis ĝuste tia, ĉar la malsanulo sin trovis senmova en komato dum tri plenaj tagoj. Ĉi-momente alvenis la informo pri la malvenko de kampanjo en Reichshoffen. Vi certe ankoraŭ memoras, kiel oni komunikis la informon. Ĝis tiu vespero, ni ĉiuj pensis, ke franca armeo gajnis grandan venkon, ekstermis dudek mil prusajn soldatojn, ankoraŭ kaptis la prusan kronprincon. Mi ne scias, kiel, ĉu pro ia miraklo aŭ ĉu ia magnetiga kuranto, la ondo de la tutlanda jubilado eĉ tuŝis nian kompatindan surdmutulan malsanulon kaj penetris en lian iluzion de paralizo. Unuvorte, ĉi-vespere, alirante al sia lito, mi ne vidis plu tiu homon en antaŭa stato. Liaj okuloj estas brilaj, lia lango ne estas tiom rigida. Li eĉ havis spiriton rideti al mi, ankoraŭ balbutis du fojojn:

“Ni ven ... kis! Ni ven ... kis!”

“Jes, Kolonelo, ni gajnis grandan venkon!”

Kiam mi detale rakontis al li pri la brila venko de marŝalo McMahon, mi trovis, ke liaj trajtoj malsulkiĝis, lia vizaĝo ankaŭ heliĝis ...

Kiam mi eliris la ĉambron, la juna knabino staris ĝuste ĉe la pordo por atendi min, ŝi havis palan vizaĝon, singultante ploris. “Li estas savita!” mi diris al ŝi, tenante siajn manojn.

Tiu kompatinda knabino apenaŭ havis kuraĝon respondi min. Pruviĝis, ke la reala situacio de Reichshoffen kampanjo ĵus publikiĝis: marŝalo Mac-Mahon forkuris, la tuta armeo estis ekstermita ... Ni rigardis unu al la alia en embaraso. Ŝi ĉagreniĝis pro la situacio de sia patro, dum mi estis maltrankvila pri malsano de ŝia avo. Sendube li ne plu povas elteni tiun novan baton ... Do, kion fari? ... Nur lasi lin ĝojiĝi, lasi lin teni tiujn iluziojn, kiuj revivigis lin...sed tiuokaze oni devas mensogi al li ... sed tiuokaze oni devas mensogi al li ...

“Nu, mi mensogu al li!” diris al mi la brava knabino, sekiginte larmojn kaj altrudinte ĝojmienon, ŝi iris en la ĉambron de sia avo.

Estis malfacila tasko, kiu estis ŝarĝata de ŝi. En la unuaj kelkaj tagoj ŝi ankoraŭ povis trakti. La bona maljunulo ankoraŭ ne estis tre normal en menso, kvazaŭ la infano, kiu estis facile trompata. Sed kiam li resaniĝis tagon post tago, liaj pensfadenoj fariĝis klaraj. Pro tio oni devis klarigi al li, kiel agadis la duflankaj armeoj, kaj ĉiutage fabriki militan raporton por li. Tiu ĉi bela knabineto aspektis vere kompatinda. Sin klinante super la germana mapo tagnokte, ŝi enŝovis flagetojn tien kaj ĉi tien sur ĝi, tiel ke li elfabrikis brilajn kampanjojn unu post alia, jen marŝalo Bazaine marŝis al Berlino, jen generalo Froissart atakis kaj okupis la regionon Bavière, jen marŝalo McMahon antaŭenmarŝis sur la balta regiono. Por fari tiujn fabrikaĵojn versimilaj, ŝi ĉiam petis de mi opiniojn kaj mi helpis ŝin laŭeble. Sed, en tiu ĉi fikcia atakmilito, tiu, kiu donis la plej grandan helpon al mi, estis la avo mem.

Sciu, ke li jam batalis en Germanio multajn fojojn dum la periodo de napoleona imperio! Fakte li antaŭsciis ia ajn militan agon de la malamikoj: “Nun ili volas marŝi ĉi tien... Jen ili agos tiamaniere...” Rezulte, liaj antaŭvidoj ĉiuj realiĝis, kio kompreneble igis lin tre fiera.

Malfeliĉe, malgraŭ ke ni kaptus multajn urbojn kaj akirus multajn venkojn, ni neniel povis kontentigi lian scivolemon. Tiu ĉi maljunulo etsis vere nesatigeble avidema! Ĉiutage, tuj kiam mi iris al lia hejmo, mi aŭdis de li novan novaĵon de venko:

“Doktoro, ni plie prenis Mayence! ” La juna knabino diris renkontante al mi, kun amara rideto, tiumomente mi aŭdis laŭtan ĝojan voĉon krii al mi tra la pordo de la ĉambro: "Bonege, bonege... Post ok tagoj ni marŝos en Berlinon!"

Fakte la prusa armeo proksimis al Parizo je ok tagoj da vojirado Komence ni diskutis translokigi lin al la alia provinco; tamen, nur se tuj kiam ni elhejmiĝos, la reala situacio de Francio faros lin kompreni ĉion. Mi opinias, ke li estas tro malforta kaj lia mensa apopleksio kaŭzita de peza bato ankoraŭ estas tre serioza, tiel ke oni ne povas lasi lin scii la veran situacion. Do ni decidis, ke oni daŭrigis lasi lin resti en Parizo.

La unuan tagon kiam Parizo estis sieĝita, mi iris al sia domo. Mi memoras, ke tiun tagon mi tre ekscitiĝis pro timo kaj maltrankvileco. Tiam ĉiuj pordegoj de Parizo jam estis fermitaj. Pro tio, ke la alpremado de la malamiko al la urbo fakte puŝis la landlimon ĝis la ĉirkaŭurbo de Parizo, ĉiuj dronis en paniko. Kiam mi eniris, la bonkora maljunulo sidis en la lito. Kun granda ĝojo li diris al mi: "Hej, oni finfine komencas sieĝi la urbon!"

Mi konsternite rigardis lin:

“Kiel, Kolonelo, vi scias ... ? ”

Lia nepino rapide sin returnis por diri al mi:

“Hej ! Jes , doktoro ... Tio estas bonega novaĵo ... La sieĝo al Berlino fine

komenciĝis.”

Ŝi diris tion farante la kudradon, kun aplombeco kaj trankvileco sur la vizaĝo ... Kiel la maljunulo naskus suspekton pri tio? Li povis nek aŭdi la hommortigan bruegon nek vidi la katastrofoplenan kaj malfeliĉan Parizon en granda malordo. Tio, kion li povis vidi el sur sia lito, estis nur angulo de la Triumfa Arko. Kaj en lia ĉambro la diversaj eluzitaj restaĵoj, kiuj ĉirkaŭis lin, efike tenis liajn diversspecajn iluziojn. Portretoj de marŝaloj de Napoleono, primilitaj lingnogravuraĵoj, bildkarto pri la roma reĝo en vestaĵoj en bebo, alta kaj longa tablo kun kupraj aĵuraj ornamaĵoj, sur kiu eksponiĝis la restaĵoj de la imperio, kiaj insignoj, etaj bronzaĵoj, rokpecoj de la insulo Sainte-Helene, metitaj sub ronda vitra kloŝo, kaj krome kelkaj portretetoj, kiuj prezentis la saman damon kun krispaj haroj kaj imponaj trajtoj, surportanta flavan robon por balo kun lozaj manikoj kaj striktaj mamunoj, ĉio ĉi tio — la longa tablo, la roma reĝo, marŝaloj, damo en flava robo, la flavroba damo, kiu, kun svelta staturo kaj zono alte portita ĉirkaŭ la talio, kiu havis dignoplenajn manierojn kaj estis multe ŝatataj en 1806 -- konsistigis la atmosferon plenan je venkoj kaj konkeroj, kiu estis pli forta ol nia mensogo al li, tiu bonkora kolonelo, kaj faris lin naive kredi , ke la franca armeo atakas Berlinon de ĉirkaŭe.

Ekde tiu ĉi tago, niaj militaj operacoj estis tre simpligitaj. Preno de Berlino estas nur demando de tempo. Post iom da tempo, kondiĉe ke la maljunulo malpacientiĝis de atendado, ni legis leteron de lia filo al li, kompreneble, la letero estas falsa, ĉar Parizo estis sieĝata hermetike kaj post kiam oni suferis malvenkon en Sedan, la stabo de marŝalo McMahon jam estis kaptita kaj eskortita al germana fortreso. Vi povis imagi kiel dolora tiu ĉi kompatinda knabino sin sentis, ĉar ŝi ricevis neniom da novaĵo pri sia patro kaj nur sciis, ke li jam estas kaptita, estas

senigita je ĉio kaj probable troviĝas en malsano.

Sed ŝi vole nevole imitis lian tonon skribi ĝojplenajn leterojn. Kompreneble la leteroj estis tre mallongaj, ĉar la soldatoj, kiuj senĉese triumfe marŝis antaŭen en konkerita lando, nur povis skribi tiajn mallongajn leterojn.

Iufoje, ŝi vere ne povis persisti plu, ĉar oni jam ne ricevis informon dum pluraj semajnoj. Pro tio la maljunulo malpacientiĝis, tiel ke li ne povis endormiĝi. Do letero el Germanio baldaŭ alvenis kaj alirinte antaŭ lian liton, ŝi gaje legis ĝin al li, retenante larmojn. La maljunulo seriozmiene aŭskultis, jen ridetante kompreneble, jen kapjesante, jen elmetante kritikojn kaj donante klarigojn al ni pri la neklaraj punktoj en la letero. Tamen lia aparta nobleco estis esprimita en lia respondletero al lia filo. Li diris: "Vi neniam forgesu, ke vi mem estas franco...traktu tiujn kompatindajn homojn kun indulgemo, ne lasu ilin senti, ke nia okupacio estas neeltenebla ..." La letero plenplenis je tiaj admonoj, kiaj protektado al privataj havaĵoj kaj respekto al virinoj, kaj je aliaj admirindaj gurditaj vortoj. Unuvorte ĝi vere servis kiel manlibro pri bonkonduktado por la venkintaj soldatoj. Kelkfoje li ankaŭ elmetis kelkajn ĝeneralajn opiniojn kaj kondiĉojn por fari pacon en sian leteron. Pri tio, mi devas diris, ke lia postulo ne estas severa. "Ni postulos nenion alian krom militkompenso... Por kio ni cedigus al ni iliajn provincojn? Ĉu ni povus ŝanĝi Germanion en Francion?..."

Kiam li diktis ĉi tiujn parolojn, la tono estas tre firma, kaj oni povis senti, ke liaj paroloj estis plenaj de naivaj sentoj, lia tiam nobla patriotismo ŝajne ne povas ne min profunde kortuŝi.

Dum tiu tempdaŭro la sieĝa ringo pli kaj pli malgrandiĝis, ho, sed ĝi ne estis sieĝo al Berlino!... Tiam estis vintro kun severa frostoj. Sub la kanonado regis epidemio kaj malsatego.

Tamen, dank' al zorgema flegado la maljunulo neniam estis ĝenata en sia trankvila resaniĝo. Eĉ en la plej malfacilaj tempoj mi kapablis akiri por li blankan panon kaj freŝan viandon. Kompreneble, tiujn nutraĵojn nur li povis manĝi. Vi imagas, ke ekzistas nenia sceno pli kortuŝa ol tiu de la avo dum manĝado: li egoisme ĝuas la manĝon, sciante nenion pri tio. Li sidis sur la lito, larĝe ridetante, kun ruĝe brilanta vizaĝo kaj buŝtuko ĉirkaŭ sia brusto. Pala nepino pro nesufiĉa dieto estis sidanta apud li. Ŝi levis lian manon kaj helpis al li manĝi supon kaj frandaĵojn, kiujn aliaj ne povis manĝi. Post vespermanĝo la maljunulo aspektis tre vigle. La ĉambro estis varma, dum ekstere malvarma norda vento blovis kaj neĝeroj flirte dancis antaŭ fenestro. Rememorante pri la kampanjo en la nordo, kiun li partoprenis, la maljuna peza kavaleriano rakontis centafoje al ni pri tiu malbonŝanca retiriĝo el Rusio. Tiam ili nur povis manĝigi al si glaciigitajn biskvitojn kaj ĉevalaĵon.

"Vi povus kompreni tion? Eta ulo, tiam ni povis nur manĝi ĉevalan viandon!"

Mi kredas, ke lia nepino persone spertis tion. La lastaj du monatoj, aldone al ŝia ĉevalo ekstere, ŝi ne manĝis ion alian... Sed la tempo pasis tagon post tago, la maljunulo laŭgrade retrovis sian sanon kaj estis pli kaj pli malfacile por ni flegi lin. Antaŭe li havis malakran sentemon kaj paralizitajn membrojn, kio kompreneble estis facile por ni senigi lin je veraj informoj, sed nun la situacio ŝanĝiĝis. Jam du aŭ tri fojojn li estis tiel konsternita, ke li eksaltis, pro la terura bruo de salvo antaŭ la pordo de Maillot, kaj streĉis siajn orelojn kiel ĉashundo. Ni vole nevole fabrikis la famon, ke, ĉar Marŝalo Bazaine plue akiris decidigan venkon ĉe la urbo de Berlino, la Hotelo de la Honoraj Invalidaj Militistoj ĵus pafis salvon por celebri la venkon. Alian tagon ni ŝovis lian liton al la fenestro — mi pensas, ke tiu tago estis ĝuste ĵaŭdo, kiam okazis sanga batalo en

